

## & Eta Mazgrev:

< Ripete 0 el 16 aŭ 4 el 20 batoj por strofo, entute 448 paŝoj dum 5 minutoj aŭ 560 paŝoj dum 7 minutoj. El angla tradukis William Auld.>

### (#Melodio:

(

(# Sen ripeto: <:2>

(o;Mi /SoSo SooSoSo /FaMi Fa3;So /doSo SoFa /So o;So /SoSo SoSo /FaMi Fa;So /doSo FaMi /Do)  
? (o;do /dodo dore /milredoo So3;do /redo doFa /So o;do /dodo dore /redo So3;do /doSo FaMi /Do) )  
?

(# Kun ripeto: <:2> a;mi /mimi mimimi /redo re;la /lami mire /mi i;la /lami mimi /redo re;la /lami  
mire /mi i;mi /lala tiillaso /la)

)×28 )+

### (& Strofoj:

'1 O/kazis foje en /iu tag' ; sam/kiel dum la /jar'  
; ke /gvatis Mazgrev /ĉe l' preĝej' (; pri l' /bela  
viri/nar'.)×

'2 Vestiĝis kelkaj en velur' ; aliaj en la lan' ; kaj  
lasta venis Barnardin' ; plej bela paroĥan'.

'3 Rigardis Etan Mazgrev ŝi ; kun hel' de  
somera sun'. ; Ekpensis Eta Mazgrev, "Nu, ;  
lordin' min amas nun."

'4 Saluton, juna bela vir', ; vin prosperigu Di', ;  
por unu nokt' en mia lit' ; oferus kion vi?"

'5 Mi ĝin ne riskus, sinjorin', ; pro l' vivo kaj  
bien'. ; De Lordo Barnard estas vi ; l' edzin',  
laŭ ringo jen."

'6 "Ĉasadon iris mia lord', ; prefere sen reven',  
; kaj dormos vi en lia lit' ; en mia ĉirkaŭpren'.

'7 Ho Mazgrev, timon lasu for, ; nenia kaŭz'  
por tim', ; ĉar eksterporde ĝis maten' ; paĝio  
gardos nin."

'8 Suferu la paĝio tre, ; li mortu en turment', ;  
ĉar al l' arbaro verda li ; rapidis kiel vent'.

'9 Kaj alveninte al l' river' ; li naĝis ĝis transa  
bord' ; kaj aliflanke de l' river' ; li kuris al sia  
lord'.

'10 Veninte al l' arbara verd' ; li serĉis en  
mallum' ; kaj trovis Lordon Barnard jam ;  
dormanta sub arbtendum'.

'11 "Vekiĝu, mastro, veku vin, ; aŭskultu al la  
dir': ; kun Mazgrev dormas via edzin', ; jam  
urĝas la ekir'!"

'12 "Se via diro estas ver' ; mi pagos per oraĵ' ;  
kaj se ĝi falsas, pendos vi ; en pendumila maŝ'.

'13 Ĉevalon mian selu tuj," ; li diris, "la nigran  
jen! ; Ne blovu kornojn," diris li, ; "senavertu  
la alven'."

'14 De lordo Barnardo unu kunul' ; al Mazgrev  
amikis tre. ; Li blovis laŭte per sia korn': ; "Ho  
Mazgrev, forkuru, ve!"

'15 "Ho, mi aŭdas kokon de l' maten' ; kaj  
garolon ĵus, ĉu ne? ; Mi aŭdas kornon de  
Barnard: Ho Mazgrev', forkuru, ve!"

'16 "Ho, kuŝu, Mazgrev, en trankvil', ; min  
ŝirmu de frosteg', ; nur paŝtisteto estas ĝi ; kun  
sia ŝafa greg'.

'17 Surstangas via akcipitr', ; la ĉeval'  
fojnumas nur: ; Jen vigla damo en brakum' ;  
kaj vi pensas pri forkur'?"

'18 Do li turnis sin kaj turnis sin ; kaj ekdormis  
sen singard' ; kaj lin apudis je l' vekiĝ' ;  
soldatoj kaj Barnard'.

'19 "Kaj kiel plaĉas mia lit' ; kaj mia litkovril'?  
Kaj kiel plaĉas mia dam' ; dormanta en  
trankvil'?"

'20 "Tre bone plaĉas via lit' ; kaj via litkovril' ;  
kaj pleje plaĉas via dam' ; dormanta en  
trankvil'."

'21 "Junul', leviĝu," diris li, ; "Rapidu iom pli, ;  
ĉar nearmiton dum la viv' ; neniām mortigis  
mi.

'22 En unu ing' mi multekostajn ; glavajn  
havas du: ; Pli bonan vi, malpli bonan mi, ;  
ekprenos por detru'."

'23 Do lante, lante leviĝis li ; kaj vestis sin sen  
vort' ; kaj lante iris tra l' ŝtupar' ; pensante pri  
la mort'.

'24 Pro l' unua bat' al Mazgrev jam ; apertis  
sanga tru' ; kaj antaŭ Barnard falis li ; kaj  
silentis ĉiam plu.

'25 Ĉu plaĉas liaj vangoj, ; ĉu l' mentonoj  
plaĉas, dam'? ; Ĉu plaĉas lia korpo ; kiam  
mankas vivoflam'?

'26 Ŝi diris: "Plaĉas lia vang', ; la mentono  
plaĉas jam ; kaj plaĉas al mi lia korp' ; pli ol  
via tuta klan'."

'27 La longan glavon prenis li ; por frapi kun  
fatal': ; La koron de la sinjorin' ; trapikis frida  
ŝtal'.

'28 Okazis foje en iu tag' ; samkiel dum la jar' ;  
ke gvatis Mazgrev ĉe l' preĝej' ; pri l' bela  
virinar'. )